

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

EN LA NOMO DE
VIVO

GRAVA ORGANIZA
MOMENTO

P I F

NACIA IFEF-
KONFERENCO

VOJAĜO TRA
SOVETIO

SEMINARIOJ
EN PISANICA

FLAMA POETO
DE LA REVOLUCIO

NI RECENZAS

ENLANDA MOVADO





LA SINDIKATOJ — REALA PACFORTO

Hodiaŭ la tuta homaro estas minacata de totala katastrofo.

La unueco kaj la aktiva agado de la laborista klaso kiel neniam ĝis nun estas necesaj al la homa civilizacio, al la vivo. La bulgaraj laboruloj, nia tuta popolo ĉiam estis en la unuaj vicoj de la pacbatalo por malarmado. Tial la kunvokita fine de oktobro en Sofio Internacia Renkontiĝo-Dialogo „La paco kaj la sindikatoj“, kiun partoprenis ĉ. 200 delegitoj el 83 landoj, estis ankoraŭ unu okazo doni bulgaran kontribuon al la grandega batalo de la mondaj sindikatoj por liberigo de la planedo el nuklea minaco.

La Renkontiĝo-Dialogo estis malfermita de Nikola Aleksiev — veterano de la bulgara sindikata movado kaj honora prezidanto de MEM.

Petâr Djulgerov, prezidanto de la Centra Konsilantaro de la Bulgaraj Profunuigoj, en sia parolado subtekstis, ke ne estas vivproblemo, kiu ne koncernas la sindikatojn. Ekzistas tamen unu problemo, kiu superas ĉiujn kaj de kiu dependas la ceteraj — mondaj, naciaj kaj regionaj, tio estas la problemo pri paco, pri malebligo de nuklea milito. La mondo kontraŭstaras la danĝeron de nova intensigo de la nuklea raket-armado, la abruptan pligrandigon de la minaco de militkonflikto. Ĉefa kaŭzo pri tio estas la decido de NATO pri lokigo de novaj usonaj nukleaj raketoj en Okcidenta Eŭropo. Pro tio la streĉiĝo atingis danĝeran ekstremojn. La ununura prudenta alternativo estas la vojo al paca kunekestado, al tutmonda sekureco kaj malarmado.

Ĉe la nuntempaj kondiĉoj ekzistas vasta, ĝenerale akceptebla bazo por formigo de unueca sindikata fronto en la pacbatalo. Ties celoj kaj postuloj devas esti: oni ne permesu instalon de novaj raketoj en Eŭropo; estu atingita decida ŝanĝo de armado je efektiva malarmado, de konfrontiĝo je malstreĉiĝo, egala sekureco kaj kunlaboro; oni subtenu la ideon pri kreo de urboj kaj zonoj, liberaj de nukleaj armiloj; la sindikatoj estigu iniciatinto kaj faktoro por redirektiĝo de la rimedoj kaj fontoj el la milita al la civitana sfero, por solvo de terglobaj problemoj kiel malsato, analfabeteco, malsanoj.

La dialogo estis honesta, malkaŝa, laborista Komuna estis la konvinko inter la partoprenantoj en la Internacia Renkontiĝo-Dialogo, ke la kunagado, kiu ofte estiĝas spontane inter la laboristoj en produktaĵoj, en apartaj urboj, en diversaj ŝtatoj — oni devas transporti ankaŭ al la internaciaj sindikataj unuigoj. Ĉar la provokojn de la agresema kaj aventureca imperiismo oni povas rezisti nur per tutmonda kaj aktiva kontraŭstaro de ĉiuj pacamaj fortoj.

Kulmina momento en la laboro de la pacama forumo estis la parolado de la unua bulgara ŝtata kaj partia gvidanto Todor Jivkov, fragmentojn el kiu ni publikigas.

La voĉoj de ĉiuj partoprenantoj en la Internacia Renkontiĝo-Dialogo unuiĝis en la akceptitan Alvokon al la sindikatoj kaj al la laboruloj el la tuta mondo — ili estu ĉiam en la unuaj vicoj de la pacdefendantoj kaj de la batalantoj por progreso kaj paca kunekestado de ĉiuj popoloj.

TELEGRAMO

La sofiaj esperantistoj profunde indignis pro la agreso de Usono kontraŭ la suverena malgranda ŝtato Grenado. Per tiu krimo la usona prezidento rompas ĉiujn jurajn kaj moralajn normojn de la internacia vivo. Li plene senmaskiĝas kiel malamiko de la libero kaj sendependeco de la popoloj.

Ni energie protestas kontraŭ tiu barbara agreso kaj insistas pri senprokrasta retiriĝo de la usonaj trupoj el Grenado.

AL UNUIGINTAJ NACIOJ,
NOV-JORKO



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 52

DECEMBRO

12 • 1983

EN LA NOMO DE VIVO

(Fragmentoj el la parolado de TODOR JIVKOV antaŭ la partoprenantoj en la Internacia Renkontiĝo-Dialogo „La Paco kaj la Sindikatoj“)

*Estimataj amikoj kaj gastoj,
Gekamaradoj,*

Vi venis tien ĉi pelataj de la komuna maltrankvilo, la maltrankvilo de la laborista klaso, de la laboruloj, pri la estonto de la mondo, vi venis por plenumi vian klasan kaj homan devon, ĉar ne ekzistas alia problemo krom la problemo pri konservado kaj stabiligo de la paco, de kiu en tioma grado dependas la sorto, bonstato kaj ekzistado ne nur de apartaj klasoj, de apartaj popoloj aŭ regionoj, sed ankaŭ de la tuta homaro.

La homaro bezonas daŭran kaj justan pacon en la tuta mondo. Ĉar daŭra povas esti nur la justa paco, paco, sin bazanta sur rekono de l'rajtoj de ĉiuj popoloj, sur estimo de la bazaj principoj de la internacia juro — egalrajteco kaj sendependeco, neinterveno en la eksterajn aferojn de la landoj, reciproka profito de la internaciaj kontaktoj.

Tute nature niaj streboj estas direktitaj antaŭ ĉio al la regiono de la Balkanoj. Ni laboras por stabiligo kaj evoluo de la bonnajbaraj rilatoj kun ĉiuj balkanaj popoloj, por ke estu trankvila la politika klimato en nia regiono.

Bedaŭrinde, sur la sojlo de la oka jardeko de nia jarcento la internacia situacio abrupte malboniĝis. Apartan maltrankvilon provokas la agoj por instalo de novaj usonaj raketoj en Okcidenta Eŭropo ĝis la fino de la kurenta jaro. Maltrankvilo, ĉar detruigas la ekvilibro de la fortoj kaj la fundamentoj de la paco kaj la sekureco — tiel en Eŭropo, kiel ankaŭ en la tuta mondo.

La novaj usonaj raketoj en Eŭropo estas armilo por nuklea neniiĝo de la mondo de socialismo. Ili havas mezaran povradion, sed figure dirite, ili havas multe pli vastan politikan povradion, ĉar per ili oni persekutas terglobajn po-

litikajn celojn.

Ce la ekestintaj cirkonstancoj la socialismaj landoj estas devigataj entrepreni la necesajn paŝojn por garantii sian sekurecon.

La termonuklea milito estas nenio alia krom maniero por memmortigo de la homaro. Tial la sekva problemo, kiun mi volas proponi al via atento, estas la batalo por paco kiel longdaŭra strategio.

Ni plene konsentas kun la pritakso de la gvidanto de l'soveta ŝtato Jurij Vladimiroviĉ Andropov, ke „la 70-aj jaroj, kiuj pasis sub la signo de serenigo en la internaciaj rilatoj, ne estis, kiel asertas iuj agantoj de la imperiismo, hazarda epizodo en la malfacila historio de la homaro“.

La batalo por la paco nun troviĝas sur tia etapo, kiam ekzistas milit-strategia ekvilibro inter la du soci-politikaj sistemoj.

La fortoj, kiuj aktive partoprenas la agadon por savo kaj stabiligo de la paco, konstante kreskas. La tutmondeco de la termonuklea katastrofo aldonas tutmondan karakteron ankaŭ al la batalo por ties evito.

La paco povas esti savita! Por tio estas necesaj la kolektivaj fortoj kaj la bona volo de ĉiuj landoj kaj popoloj, de ĉiuj partioj, organizoj kaj movadoj, de ĉiuj homoj.

En la batalo por paco la laborista klaso havas historian rolon kaj historian respondecon. Mi volas esprimi mian konvinkitecon, ke ĉiu aktivulo de la sindikata movado, sendepende de sia politika kredo, komprenos tiun sian respondecon. La postuloj de la vivo devigas nin elimini la diferencojn kaj antaŭjuĝojn por vidi, ke ni havas komunajn interesojn kaj respondecon, ke super ĉio staras la neceso pri unuigo de la fortoj kaj komuna agado en la nomo de la paco.



OPTIMISMA KOMENCO DE BALKANA E-KUNLABORO

La ideo pri transformiĝo de la Balkanoj en pazonon, liberan de nukleaj armiloj, renkontas aktivan subtenon fare de la esperantistoj el la balkanaj landoj. Sian pretecon insisti, ke tiu pacama ideo realiĝu en intereso de la komuna sekureco kaj bonnajbareco de la balkanaj popoloj, ili esprimis dum la okazinta la 8-an kaj 9-an de oktobro k. j. en Bankja Unua Renkontiĝo de Balkanaj Esperantistoj. Ĉeestis 26 reprezentantoj de la E-asocioj el Greklando, Jugoslavio kaj Turkio, krom ili partoprenis membroj de la Centra Estraro kaj reprezentantoj de Distrikaj Estraroj de Bulgara Esperantista Asocio.

Hristo Gorov, prezidanto de CE de BEA, per mallonga parolado solene malfermis la renkontiĝon kaj prezentis la personojn, okupintajn lokojn en la honora prezidantaro: Nikolaj Georgiev, unua vicprezidanto de la Nacia

Konsilantaro de Patrolanda Fronto, Atanas Velkov, vicprezidanto de la Subdistrikta Popola Soveto — Bankja, Petâr Todorov, estrarano de UEA, Hristo Kanev, prezidanto de la Urba Estraro de BEA — Sofio kaj reprezentantoj de la balkanaj E-asocioj. Salutparolojn faris Atanas Velkov, Petâr Todorov — de la Estraro de UEA, Haim Levi — de la Urba Estraro de BEA — Sofio, Radiša Kovačević — de Jugoslavio E-Ligo, Maria Pontika — de Helena E-Asocio, Bekir Karajel — de la Turka E-Asocio kaj Ivan Keremidčiev — de Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio.

Referaĵon pri la balkanaj interrilatoj kaj kontaktoj inter la esperantistoj tralegis K. Vălev, ĝenerala sekretario de CE de BEA. Apartan atenton li turnis al la faktoj pri kunlaboro inter la bulgaraj kaj balkanaj esperantistoj, pri manifestaĵoj de amikeco kaj bonnajbareco



Partoprenintoj en la Unua Renkontiĝo de Balkanaj Esperantistoj

oto: Hristo Metev

inter ili. K. Vălev ankaŭ konigis al la ĉeestantoj la plej gravajn momentojn el la historio de la bulgara E-movado kaj la nuntempan staton kaj aktualajn taskojn de la bulgaraj esperantistoj. Li substrekis, ke nun sankta devo de la esperantistoj el la balkanaj landoj estas labori per ĉiuj fortoj por firmigi la spiriton de bonnajbareco kaj amikeco inter ili, por progresigi la aferon de la paco sur la Balkanoj.

Kunĉo Vălev alvokis al regula laŭplana E-kunlaboro inter la balkanaj E-asocioj, pri kio oni devas akcepti specialan programon. (Parton de la referaĵo de K. Vălev ni publikigos en iu el la sekvaj numeroj de „BE“).

Dimităr Papazov, sekretario de CE de BEA, prezentis projektoprogramon pri komunaj iniciatoj lige kun la centjara jubileo de Esperanto. Estas planataj: fondo de Balkana Komitato pri celebrado de la centjara jubileo de Esperanto, ellaboro de enlandaj planoj por celebrado de la Esperanta jubileo kaj ties interŝanĝo por reciproka informiĝo, kultura festivalo de la balkanaj esperantistoj, ĉiujaraj renkontiĝoj de la esperantistoj el la balkanaj landoj, jubileaj eldonaĵoj, ekspozicio pri la balkana E-movado. . .

Sekvis diskutado pri la projektoprogramo, dum kiu oni kompletigis ĝin per valoraj proponoj kaj sugestoj. Estis decidite, ke BEA serdos la ampleksigitan projektoprogramon pri celebrado de la 100-jara jubileo de Esperanto al la gvidorganoj de la balkanaj E-asocioj por traktado kaj fina akcepto. Okazis laborkunsiĉo de gvidaj reprezentantoj de la balkanaj E-asocioj.

Oni prezentis riĉan belartan programon kun la partopreno de aktoroj el sofiaj teatroj kaj Sofia E-Horo.

Dimanĉe okazis renkontiĝo kun Angel Vasev, ĉefsekretario de la Komitato pri Balkana Kompreniĝo kaj Kunlaboro. Li prezentis la agadojn kaj nunajn taskojn de la Komitato. A. Vasev emfazis la starantan nuntempe en la centro de atento ideon pri transformiĝo de la Balkanoj en paczonon, liberan de nukleaj armiloj. Li detale rakontis pri komunaj iniciatoj kaj aranĝoj kun la komitatoj pri balkana kunlaboro en la koncernaj landoj kaj esprimis la pretecon de la Komitato pri Balkana Kompreniĝo kaj Kunlaboro por komuna agado kun Bulgara Esperantista Asocio. Angel Vasev estis afabla respondi ĉiujn demandojn de la ĉeestantoj.

La Unua Renkontiĝo de Balkanaj Esperantistoj, okazinta en varma kaj amika etoso, manifestis la volon de la balkanaj esperantistoj vivi en Balkanoj, liberaj de nukleaj armiloj, en zono de paco. Oni metis komencon de komunaj E-iniciatoj en la balkana regiono.

**MARIANA GAJDAROVA
SVETLA STRATIEVA
EVGENI GEORGIEV**



Hristo Gorov, prezidanto de BEA (en la mezo) en amika interparolo kun eksterlandaj gastoj

Foto: Hristo Metev

Resonoj

MARIA PONTIKA, prezidantino de Helena E-Asocio:

— La Unua Renkontiĝo de Balkanaj Esperantistoj estis fruktodona kaj devigas nin ĉiujare kunlabori, por ke nia agado fariĝu subtenata de la balkanaj ŝtatoj. Min ĝojigis kaj impresis forte la bulgara gastamo.

Dankon al la iniciatintoj kaj organizantoj pro iliaj klopodoj kaj zorgoj pri nia agrabla restado en Bankja.

BEKIR KARAJEL, reprezentanto de Turka E-Asocio:

— La tri tagoj, pasigitaj en la bela kaj freŝaera urbeto Bankja, tre kontentigis min. Dum miaj interparoloj kun reprezentantoj el la balkanaj landoj mi konstatis la neceson de kunlaboro kaj proksimiĝo inter la balkanaj popoloj.

Mi ne dubas, ke estonte la Balkanoj nepre estiĝos zono de paco kaj bonnajbaraj interrilatoj. La bulgaraj esperantistoj metis komencon de la balkana E-kunlaboro kaj mi kredas, ke ĝi sukcese daŭros.

RADIŠA KOVAČEVIČ, prezidanto de Serba E-Ligo:

— Mi konsideras tre utila la iniciaton de la bulgaraj esperantistoj kunvoki la Unuan Renkontiĝon de Balkanaj Esperantistoj. Mi bondeziras sukcesojn al estontaj komunaj E-renkontiĝoj de la balkanaj esperantistoj, kiuj okazu ĉiujare en alia lando. Tio certe kontribuos al la interkompreniĝo kaj amikeco inter la balkanaj popoloj.

En la nomo de ĉiuj partoprenantaj jugoslavoj mi dankas pro la bonaj loĝ- kaj laborkondiĉoj.

GRAVA MOMENTO EN NIA ORGANIZA VIVO

La raport-elektaj kunvenoj kaj konferencoj estas grava momento en la vivo de la E-societoj kaj organizaĵoj. De ilia regula kaj ĝustatempa okazigo grandparte dependas la ekzisto kaj estonta agado de la societoj.

Laŭ decido de la Buroo de CE de BEA, de 15.XII.1983 ĝis 15.II.1984 devas okazi la raport-elektaj kunvenoj, kaj de 1.III.1984 ĝis 20.IV.1984 — la raport-elektaj konferencoj. La regula okazigo de la raport-elektaj kunvenoj en la distriktoj postulas de DE de BEA maksimuman fortoŝtreĉon por helpi per konkretaj agoj ilian bonan organizon. Ĉiu membro de buroo de DE de BEA devas respondi por iu aparta E-societo en la distrikto. Ĉiuj respondeculoj devas organizi renkontiĝojn kun la malnovaj societaj estraroj, informiĝi pri la solvendaj problemoj de la societoj, helpi la ellaboron de plano por preparo kaj okazigo de la raport-elekta kunveno. Samtempe ili devas konatiĝi kun la esperantistoj, antaŭviditaj en la nova societa estraro, kaj prezenti la projekton al DE de BEA. La burooj de DE de BEA devas anticipi pridiskuti la projekto-listojn de la novaj societaj estraroj. Oni ne devas permesi, pro nesufiĉa preparlaboro, la elekton en la societaj estraroj de nekonvenaj, hazardaj personoj, kiuj povus kaŭzi malfortigon, eĉ malprogreson de iuj el la so-

cietoj. Same oni ne devas permesi okazigon de la raport-elektaj kunvenoj sen ĉeesto de reprezentanto de DE de BEA, kiu anticipe helpis por preparo de la raporto kaj la rezolucio. Ili (la raporto kaj la rezolucio) devas esti enhaviĉaj kaj konkretaj, klare montrantaj la atingojn kaj mankojn en la antaŭa agado de la societo kaj la ĉefajn direktojn por la estonta laboro. Estas dezirinde okazigi la raport-elektajn kunvenojn en konvena ejo, solene, kiel festo en la vivo de la societo. Dum la raport-elektaj kunvenoj oni devas elekti ankaŭ delegitojn por la distrikta raport-elekta konferenco laŭ la normoj, akceptitaj de la Buroo de DE de BEA.

Ne malpli grandan atenton oni devas turni ankaŭ al la raport-elektaj konferencoj — supera forumo de la distrikta E-organizaĵoj. Ilia preparo devas komenciĝi ĝustatempe. Ĉi-jare ni devas strebi eviti ilian okazigon, kiel kutime, en la lasta momento, same ilian prokraston pro tiu aŭ alia kaŭzo, ĉar tio rompas la ritmon por la tuta lando kaj efikas malfavore sur ilian okazigon. Por la organizo kaj okazigo de la raport-elektaj kunvenoj estas necese anticipi ellabori planon, inkludantan tiel la preparon de la materialoj, kiel ankaŭ la teknikan preparon. Tiel oni evitos la senplanan kaj senritman realigon de tiu

tre grava organiza laboro. La raporto kaj la rezolucio ne devas esti faro de nur unu el la respondecaj gvidantoj, ili devas esti kolektiva faro. Tiel ne estos allasita subjektiveco en la pritaksoj. Apartan atenton DE de BEA devas turni al la novaj estraroj, precipe al la estontaj burooj. En ili devas esti elektitaj la plej agemaj kaj aktivaj esperantistoj, kiuj per sia ĝisnuna laboro pruvus sian seriozan rilaton al la E-agado, kaj ankaŭ junaj esperantistoj, kiuj iom post iom akiros sperton en la laboro de la distrikta estraro. Dum la raport-elektaj konferencoj oni ne elektos delegitojn por la kongreso. Estas dezirinde malfermi aŭ fermi la konferencojn per mallonga literatura-muzika programo, por ke same kiel la raport-elektaj kunvenoj, ili pasu en solena atmosfero.

Post la raport-elektaj kunvenoj kaj konferencoj aparte grave estas (por ĝustatempa ricevo de aktualaj informoj dum la antaŭstaranta raportperiodo) tuj sendi al CE de BEA la adresojn de la novaj estraroj.

La regula organizo de la raport-elektaj kunvenoj kaj konferencoj estas garantio por ilia bona okazigo, kaj rezulte — por fruktodona E-agado dum la antaŭstaranta raportperiodo.

DIMITAR PAPAŖOV

ENCIKLOPEDIO DE LOVEĈ-DISTRIKTO

En Loveĉ estas verkata kvinvoluma enciklopedio pri politikaj, ekonomiaj, historiaj kaj kulturaj eventoj sur la teritorio de Loveĉ-distrikto ekde la antikveco ĝis la nuntempo. Ĉefredaktoro tiu de ĉi multpaĝa eldonaĵo estas nia samideano Canko Ignev.

En la enciklopedio estos publikigitaj multaj apartaj artikoloj pri la E-vivo en la distrikto: esperantistaj konferencoj kaj kongresoj, aktivuloj de la E-movado,

eminentaj esperantistoj, naskitaj en la distrikto k.a.

La Distrikta Estraro de BEA — Loveĉ subvencias la fondaĵon de enciklopedio per la sumo de 5000 levoj, respondante tiamaniere al la alvoko por kolekto de monsumoj el organizaĵoj, uzinoj, entreprenoj kaj aliaj instancoj.

Ni bondeziras plenan sukceson al tiu ĉi granda kaj patriota iniciato.

„La bulgaroj ĝojigis la infanojn...”



Jen estas la titolo de informo pri la 16-a Pupateatra Internacia Festivalo (PIF), aperinta en la oficiala zagreba ĵurnalo „Vjesnik” la 9-an de oktobro 1983.

Ĝi aperis post la konkursa prezento de „Kiam ekfloras la lekanto” — teatraĵo por etaj infanoj de Rada Moskova (enscenigo de la reĝisoro Zlati Zlatev, pupoj kaj scenografio de la merita pupisto Ivan Conev, traduko — Belka Beleva). La teatraĵon realigis geaktoroj el la Ŝtata Pupateatro en urbo Tolbuhin.

Dum la konkursa spektaklo interpretanto, kompreneble, mankis: tamen dum la ceteraj tri spektakloj — por kroataj infanoj, nia ĉar-

ma akompanantino Vera Roknić el Zagrebo magie enkondukis la infanojn en la pupan regionon: ŝi rakontis la enhavon de la teatraĵo kaj prezentis la ŝatatajn heroojn: Urseto, Leporo, Azeneto, Anasoj — panjo kaj idoj kaj la Ruza Vulpo, ĉiuj mirigitaj pri la ekfloranta lekanto — bela, milda, fidela kiel la vera amikeco.

Tuj post la prezento en Esperanto la infana publiko suriris la scenejon, volis tuŝi la pupojn, movigi, ekvivigi ilin, fotografi sin kun la pupoj, kun la pupistoj.

Por sia renkontiĝo kun la festivala publiko la geaktoroj diligente sin preparis sub la gvidado de docento Georgi Dimov el Varna, kiu helpis al ili perfektigi sian Esperanto-parolon. La respondeca rilato al sia laboro ornamis ilin per duapremio pro altnivela Esperanto-parolo sur la scenejo. Individuan premion por ekstersceneja uzado de Esperanto gajnis la Urseto — la aktorino Margarita Siškova, kiu jam trian fojon partoprenis en la festivalo.

La pupaktoroj el la teatro en Tolbuhin organizis „Bulgaran Vesperon” por ĉiuj partoprenantoj en PIF, dum kiu regis vero amika kolega etoso per Esperanto — estis piezentitaj diapozitivaj pupaj teatraĵoj, libroj, memoraĵoj, oni kantis kaj amuziĝis.

La teatraĵtrupoj el Japanio, Svedio, Hungario, Francio, Pollando, Jugoslavio pliriĉigis la nombron de interesaj eksperimentoj, tradiciaj spertoj, specoj de pupoj. Estis realigitaj utilaj interparoloj, renkontiĝoj kum malnovaj kaj novaj konatoj. Per varma gastamo la organizantoj kaj dommastroj de la ĉi-jara Pupateatra Internacia Festivalo en Zagreb okazigis novan feston por la esperantistoj — ŝatantoj de la pupa teatroarto.

BELKA BELEVA

TRIA NACIA KONFERENCO DE FERVojISTOJ-ESPERANTISTOJ

Kiel ni jam informis en n-ro 11/1983 (vidu la intervjuon kun s-ro prezidanto de IFEF Joachim Giessner el FRG) la 36-a kongreso de la Internacia Federacio de Esperantistoj-Fervojistoj (IFEF) okazos en majo 1984 en la fama bulgara somerrestadejo „Suna Bordo” ĉe la Nigra Maro.

Lige kun la preparo de la antaŭstaranta kongreso la 1-an kaj 2-an de oktobro ĉi-jare en „Suna Bordo” okazis la Tria Nacia Konferenco de IFEF. Ĉeestis la estraroj de la fervojistaj E-societoj kaj delegitoj el tuta Bulgario, entute 70 personoj.

La laborprezidentaron de la konferenco partoprenis la delegitoj de BEA Petâr Todorov

Krâstju Karucin, Dončo Hitrov, Georgi Dolapčiev, Marin Marinov kaj la gastoj-delegitoj familio De Bruyne — fervojistoj-esperantistoj el Belgio.

Raporton pri la unujara agado faris la prezidanto de la Fervojista E-Sekcio Marin Marinov. Estis pripensitaj la antaŭstarantaj taskoj lige kun la kongreso.

Eldirojn faris multaj delegitoj, kiuj faris viorajn proponojn. El la eldiroj estis videbla la granda intereso, per kiu oni atendas la okazigon de la laŭvica internacia kongreso de IFEF en nia lando. Estis konstatite, ke la preparo de la kongreso pasas normale.

Ankaŭ dum la interkona Vespero la delegi-

toj havis eblecon interŝanĝi pensojn kaj opiniojn lige kun la kongreso.

Oni informis, ke la Kvara Nacia Konferenco de IFEF okazos venontjare en urbo Gorna Orjaĥovica.

Post la fermo de la konferenco la kunlaborantoj de la organiza kongresa komitato (20 personoj) partoprenis unusemajnan refreŝigan kurson de Esperanto.

La Tria Nacia IFEF-konferenco finis sukcese sian laboron. Kaj ni ĉiuj jam senpacience atendas la kongresan renkontiĝon en „Suna Bordo“, la 11-an de majo 1984, kie la bulgaraj dommastroj de la kongreso akceptos kaj el-kore bonvenigos la alilandajn gastojn de nia sunplena lando.

VERKA ŜTAJNER



Partoprenintoj en la Tria Nacia Konferenco de Esperantistoj-Fervojistoj en „Suna Bordo“

GASTE AL SOVETIAJ ESPERANTISTOJ

Lige kun la 60-a datreveno de la Septembra Ribelo 1923, kiun la bulgara popolo solene celebris ĉi-jare, la Buroo de CE de BEA sendis kvarpersonan grupon al Sovetunio kun tasko efektiviĝi tie kunvenojn-konzertojn dediĉitajn al la jubileo. La konsisto de la grupo estis: gvidanto — Kunĉo Vălev, ĝenerala sekretario de BEA, la kantistinoj Maria Angelova kaj Stefka Kalimenova kaj la recitantino Angelina Sotirova.

Kun granda plezuro ni fiksas nian vojon tra la Sudo de la granda sovetia lando. En daŭro de 24 tagoj ni vizitis 9 urbojn: „Harkov, Rostov ĉe Don, Krasnodar, Soĉi, Tbilisi, Erevan, Taŝkent, Samarkand, Odeso. La veturado okazis per trajno, precipe nokte, ĉar ni ne deziris perdi por tio la tagan tempon, necesan al ni por organizi la kunvenojn, por provludoj (ĉiam kun nova loka pianisto-akompananto), por vizitoj al diversaj sociaj instancoj kaj por konatiĝo kun la urboj. Ĉie ni organizis kunvenojn-konzertojn: en Taŝkent tri — por civitanoj, en lernejo „Georgi Dimitrov“ kaj en la Ŝtata Konservatorio; en Samarkand — du — por militservanoj kaj civitanoj en la Domo de Oficiro kaj en la meza muziklernejo. Kelkloke la konzertoj okazis en kulturdomoj de sindikatoj (Harkov, Rostov, Odeso), aliloke en Domo de Instruisto (Krasnodar, Tbilisi), en Centra Junulara Domo (Erevano) aŭ en Esperanto-klubo (Soĉi).

Komence de ĉiu konzerto mi faris en Esperanto nelongan prelegon pri la Septembra Ribelo (kelkloke en rusa lingvo — por neesperantista publiko), post kio sekvis belarta programo: Sotirova recitis fragmenton el la poemo „Septembro“ de Geo Milev kaj la poemon

„Odo pri Sovetunio“ de Orlin Orlinov, Angelova kaj Kalimenova plenumis — precipe en Esperanto, duete aŭ sole, revoluciajn kaj popularajn kantojn, kaj ankaŭ kantojn de klasikaj kaj nuntempaj komponistoj.

Fine de la konzertoj ni donacis al niaj dommastroj E-librojn por la klubaj bibliotekoj: la raporton de T. Jivkov antaŭ la XII kongreso de BKP, la verskolekton „Septembro estis majo“, la novelon „Mia vivo“ de Trifon Hristovski, la romanon „Vilaĝo Borovo“ de Krum Velkov, la poezikolektojn „Gradu la pacon“ de Asen Grigorov kaj „Ribela Kordo“ de Hristo Gorov. Ni donacis ankaŭ po 4—5 ekzemplerojn de la murkalendaro de la Internacia E-kursejo por 1984.

Kelkloke (en Soĉi, Erevano, en la konservatorio de Taŝkent) post nia programo la dommastroj ankaŭ plenumis kantojn.

En Krasnodar kaj Samarkand ni estis oficiale akceptitaj en la urbaj komitatoj de Kom-somolo, en Erevano kaj Taŝkent — en la filioj de la Societo por Kulturaj Ligoj kun Eksterlando.

Ĉie la sovetaj kamaradoj renkontis nin amike, frate. Ili klopodis organizi bone la kunvenojn-konzertojn kaj nian restadon mem. Ĉie ili montris al ni la rimarkindaĵojn de siaj urboj; rakontis pri ties pasinteco kaj nuntempo. Ni en neniu urbo preterlasis viziti la historian muzeon, kie oni kiel en spegulo vidas la pasintan kaj nunan vivon de la popolo.

En Harkovo niaj dommastroj montris al ni la majestatan monumenton memore al la pereintoj en la Patrolanda Milito — ĝi staras sur la loko, kie la germanaj faŝistoj mortigis dek-milojn da loĝantoj sendiference de aĝo kaj

sekso. En Rostov oni montris al ni la vastan placon „Pleven“ (Rostov kaj Pleven estas ĝemelurboj) kun la Muzeo de Amikeco, en kiu du trionoj de la eksponaĵoj estas dediĉitaj al Bulgario.

En la historia muzeo de Krasnodar ni kun profunda emocio kaj respekto ekstaris antaŭ la portreto de Epistinia Feodorovna Stefanova, patrino-heroino, kies 9 filoj pereis por la patrolando.

En la belega Soĉi ni kun intereso trarigardis la Botanikan Gardenon kun ĉ. 2000 specoj de arboj kaj arbustoj el la tuta mondo. Laŭ mia deziro oni kondukis min al la Arbo de Amikeco, pri kiu mi multfoje legis. Evidentiĝis, ke ĝi estas citrusa arbeto, plantita en 1934, ĉirkaŭ kiu nun estas 10—15 junarbetoj. Sur ili jam estas 572 greftoj faritaj de homoj el 137 landoj (ankaŭ el Bulgario) — elstaraj sociagantoj kaj ŝtatestroj, verkistoj, artistoj, sciencistoj, kosmonaŭtoj ka.

En la ĝardeno en aparta konstruaĵo estas aranĝita Muzeo de Amikeco, al kiu bonvolaj homoj el la tuta mondo sendis ion ligitan kun la nomo de iliaj eminentaj samlandanoj, grave kontribuintaj al la tuthomara progreso aŭ pereintaj en batalo por libero kaj feliĉo de la popoloj. Ĉi-tie estas grundo el la tomboj de Marx, Lomonosov, Tolstoj, Thäelmann k. a., el la naskiĝurbo de Abraham Lincoln, el la

faŝistaj koncentrejoj de la morto en diversaj eŭropaj landoj.

Nin, bulgarojn, aparte emociis la portretoj de Vasil Levski kaj Hristo Botev, metitaj en la vico de eminentaj filoj de la tuta homaro. Emociis nin ankaŭ la portreto de d-ro Zamenhof super plenmano — da grundo el lia tombo en Varsovio.

Nia vizito en Sovetunio estas ambaŭflanke utila. Al la sovetaj kamaradoj ni konigis paĝon el la gloraj bataloj de nia popolo por libero kaj socia justeco, ni rakontis al ili pri nia E-movado kaj pri ĝiaj plej gravaj aktualaj taskoj. Ĉie ni invitis ilin gastigi al ni — enkadre de naciaj revuoj de E-Parolo kaj Kanto, de recitaloj, E-kursoj, Internacia Somera E-Universitato aŭ simple kiel turistoj. Samtempe ni prezentis al ili altnivelan recitadon kaj kantojn en Esperanto kaj ni prezentis la Internacian Lingvon en dinamiko, en viva praktika laboro.

El la grandega frata lando ni revenis plenaj je impresoj kaj sentoj de kreskanta amikeco. Nia vizito riĉigis nin per personaj konatiĝoj kun multaj sovetaj esperantistoj, inter ili ankaŭ la plej elstaraj gvidantoj de la E-movado en ĉiuj vizititaj urboj. Tiuj personaj kontaktoj estos tre utilaj kaj por ni kaj por ili en nia estonta E-laboro.

KUNĈO VALEV

Seminario pri ĵurnalistiko kaj tradukado

La 13-an — 16-an de oktobro j.k. CE de BEA organizis en IEK — Pisanica tre atentokaptan kaj utilan aranĝon — seminariojn por ĵurnalistoj kaj tradukistoj.

La Seminarion por Ĵurnalistoj (duan laŭvice post la seminario en Plovdiv, aŭtune de 1981) gvidis Donĉo Hitrov — ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“.

En 12 seriozaj kaj kompetentaj lekcioj D. Hitrov tuŝis gravajn principajn problemojn de la ĵurnalistiko el vidpunkto teoria kaj praktika. Li detale parolis pri la ĵurnalista agado, komencante de ĵurnalistikaj ĝenroj, traktante la problemojn de ĵurnalista verkado, por atingi teknikajn demandojn pri eldonado kaj disvastigado de la revuo.

Dank' al sia granda ĵurnalista sperto D. Hitrov sukcesis en tiu mallonga tempo doni valorajn direktojn kaj konsilojn pri la laboro de esperantistoj-ĵurnalistoj — libervolaj kunlaborantoj de „Bulgara Esperantisto“. Substrekante, ke tre respondeca tasko por ĉiu esperantisto estas informi sian revuon pri gra-

vaj kaj interesaj momentoj el la vivo de sia societo, la lektoro tamen turnis atenton sur la fakton, ke la informoj devas esti verkitaj en konvena formo, laŭ konvena maniero. Li klarigis al la partoprenantoj la ĉefajn trajtojn kaj la plej gravajn taskojn de la nuntempa E-ĵurnalistiko kaj la kvalitojn, kiujn ĉiu E-ĵurnalista devas posedi kaj konstante pliperfektigi. Konklude D. Hitrov atentigis pri la nuna politika situacio en la mondo, pri la batalo de la popolamasoj por paco, kontraŭ la minaco de nuklea milito, kaj klarigis la taskojn de la esperantistoj-ĵurnalistoj tiurilate.

Provokis intereson kaj estis bone akceptita la lanĉita en aparta lekcio ideo pri la tiel nomata „murgazeto“, kiun ĉiu E-societo povus eldoni. La murgazeto estas tre utila propagandilo de la agado de la lokaj societoj kaj samtempe — spegulo de ilia laboro kaj maniero por manifestiĝo de la komencantaj E-ĵurnalistoj.

La Seminario por E-Ĵurnalistoj denove pruvigis la utilecon de similaj iniciatoj de CE de BEA, ĉar novaj kadroj konstante eniras nian



La kursanoj en la Seminario pri Ĵurnalistiko en IEK-Pisanica

movadon kaj esprimas deziron kunlabori al niaj eldonoj. Kompreneble, por ili estas necesaj konstanta helpo kaj zorgo, kiujn povus garantii nur regula okazigo de la seminario.

VANJA TODOROVA

La bulgaraj esperantistoj povas esti fieraj, ĉar nia movado flegis en sia medio bonegajn tradukistojn kiel Asen Grigorov, Iv. Krăstănov, Atanas D. Atanasov (Ada), Simeon Simeonov, Atanas Lakov kaj multaj aliaj. Sed la vivo iras antaŭen, novaj generacioj venas en niajn

vicojn kaj jam akre sentigas la bezono plenumi la vakajn lokojn de multaj el tiu rimarkinda plejado.

Por la celo, kiel ni jam informis en n-ro 11/1983 de „Bulgara Esperantisto“, estis fondita Tutlanda Amika Rondo de Tradukemuloj (TART).

Nova serioza paŝo tiurilate estas la Seminario por Tradukistoj, realigita sub la sperta gvidado de Violin Oljanov, gvidanto de TART.

En la seminario partoprenis 10 personoj el diversaj lokoj de nia lando, inter kiuj estis ankaŭ kelkaj spertaj tradukistoj kiel Neno Janev el Gabrovo, Nikolaj Uzunov el Haskovo ka. La plimulto de la partoprenintoj estas anoj de TART.

Dum la kvartaga seminario V. Oljanov parolis pri iuj bazaj principoj de la tradukarto. Estis diskutataj la uzado de vortaroj kaj diversaj aliaj helpiloj ĉe tradukado, iuj pli komplikaj gramatikaj kategorioj, transskribo de propraj nomoj, tradukado de proverboj kaj de komplikaj frazoj. Fine la lektoro informis la kursanojn pri la korektosignoj, kiujn ĉiu tradukisto devas scipovi apliki en sia laboro.

La bona lingva nivelo de la partoprenantoj kontribuis por la sukcesa laboro de la seminario. Ĝi estis la komenco de pli longdaŭraj kursoj por tradukistoj, okazontaj en februaro kaj oktobro venontjare.

NEDKA VALJAVIČARSKA

TRIA METODIKA E-KONFERENCO

La 3-an — 4-an de septembro j. k. en Sofio okazis la Tria Metodika Konferenco de E-instruistoj en lernejoj. Ĝi estis organizita de la Ministerio de Popola Klerigo kaj de la Instruista Sekcio ĉe BEA. Partoprenis ĉirkaŭ 80 instruistoj el la tuta lando.

En la nomo de la Ministerio la konferencon salutis inspektoro Nikola Velčev.

Kunĉo Vălev, ĝenerala sekretario de BEA kaj prezidanto de la Instruista Sekcio prelegis pri temo „La kleriga kaj eduka valoro de E-instruado en lernejoj“. Li substrekis, ke la praktiko delonge pruvis la utilecon de la E-instruado en la lernejoj. Ĝi altigas la ĝeneralan kulturan nivelon de la lernantoj kaj aktive kontribuas por ties edukado en spirito de patriotismo, internaciismo, humanismo kaj pacamo. Tial la E-instruado en lernejoj estas ĉiel subtenenda kaj de gvidantoj de lernejoj, kaj de la Ministerio de Klerigo.

En sia raporto Marin Băcev, ĉefa metodikisto ĉe CE de BEA, traktis la problemon pri

E-instruado en lernejoj dum la pasinta lernojaro. La nombro de lernantoj, kiuj studis la lingvon fakultative aŭ en studrondoj atingis 1700 en 91 E-grupoj. Sed tiuj ciferoj estas neplenaj pro manko de informoj el ĉiuj lernejoj.

Marin Băcev substrekis kiel gravan akiron la ĉiujaran kurson de Esperanto por 50 instruistoj, kiun organizas la Ministerio de Popola Klerigo kaj la Instruista Sekcio. Bedaŭrinde, kelkaj DE ne sendas kandidatojn al la kurso. La raportanto emfazis la gravan taskon: surbaze de ĉiu sukcesa kurso oni fondu E-klubon en ĉiu lernejo, kiu membru kolektive en la Klubo de Internacia Amikeco.

La dua tago de la konferenco komenciĝis per metodika leciono fare de K. Vălev. Li instruis la sufiksojn *ig* kaj *iĝ*. Post tio M. Băcev atentigis pri ne bona prononco ĉe iuj bulgaraj esperantistoj sub la influo de la nacia lingvo (precipe la forta reduktado de la voka-

loj a, e). Oni koncize informis pri la konferenco de ILEI en Portugalio kaj pri la Tago de Lernejo enkadre de UK de Esperanto en Budapeŝto (M. Bâcev) kaj pri la Somera E-Universitato en Gyula (Cvetanka Kostova).

La Tria Metodika E-Konferenco sukcese finis sian laboron. La partoprenantoj estis in-

formitaj kaj pensigitaj pri gravegaj kaj aktualaj taskoj kaj problemoj de nia instrua, eduka kaj metodika laboro kaj riĉigitaj per bona sperto el la praktika agado sur tiu ekskluzive grava kampo de nia E-movado.

K. V.

Salutparolo

de Nikola Velčev, reprezentanto de la Ministerio de Popola Klerigo, al la Tria Metodika E-Konferenco

La Ministerio de Popola Klerigado alte taksas la bonegan patriotisman kaj internacian agadon de la bulgaraj esperantistoj. Guste pro tio ĝi respondis al la postulo de la nova tempo kaj enkondukis fakultativan lernadon de Esperanto en la mezlernejojn. La Ministerio rekomendas, ke la instrua kaj eduka laboro per Esperanto ligiĝu pli kaj pli intime kun la ĝenerala instrua kaj eduka laboro en la lernejoj. La agado de la kluboj de lernantoj-esperantistoj devas ĉiam pli intime ligiĝi kun la laboro de la Komsomolo, ĝenerale la laboro per Esperanto en la lernejoj estiĝu pli kaj pli plenvalora kaj eduka faktoro. Al la instruista Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio ni

direktas la rekomendon kaj bondeziron ĉiam pli kaj pli bone organizi la preparon de instrukadroj kiel por la lernejoj, tiel ankaŭ por la civitanaj kursoj. Pri tiaj kadroj nun ekzistas akra bezono. Vi devas zorgi pri bonaj kaj variaj instruhelpiloj kaj ĝenerale meti la instruadon de Esperanto sur la nivelon de la nuntempaj postuloj al la fremdlingva instruado. En tiu respondeca laboro la Ministerio de Popola Klerigo ĉiuflanke helpos vin.

Ni deziras al vi novajn, ĉiam pli grandajn sukcesojn sur la kampo de internacia amikeco kaj kultura kunlaboro, por stabiligo de la paco en la tuta mondo!

100 jarojn Esperanto

E-VETERANO REMEMORAS...

Mi naskiĝis en vilaĝo Oreĥovec, distrikto de urbo Ser, Makedonio, en 1894. Mia familio estis ege malriĉa, pro tio mi finis nur 4-an klason de la elementa lernejo en mia naskiĝvilaĝo.

Esperanton mi ellernis aŭtodidakte en 1919, kaj de 1924 mi estas regula membro de E-societo „Radio“ en Pazargik. Dum pluraj jaroj mi estis ĝia prezidanto, membro de la Revia Komisiono, sekretario ktp.

Dum la pasintaj jaroj mi subtenis amikajn kontaktojn — personajn kaj perleterajn, kun multaj bulgaraj kaj fremdlandaj geesperantistoj. De 1929 ĝis 1969 mi estis delegito de UEA kaj partoprenis en preskaŭ ĉiuj kongresoj de BEA kaj en la UEA-kongresoj en Budapeŝto (1929, 1966), en Varsovio (1959), en Sofio (1963) kaj en Varna (1978). Mi regule kunlaboris en la Esperanta paĝo de ĵurnalo „Zarja“ („Aŭroro“); estis korespondanto de revuo „Popola Fronto“ (Hispanio) en 1936—1937. Viglan korespondadon mi havis kun s-ro Anton



Antaŭ la tombo de Zamenhof en Varsovio

Balague — unu el la iniciatintoj pri la kreo de Mondpaca E-Movado en 1953 en urbo St. Pölten, Aŭstrio.

Dum multaj jaroj mi kunlaboris kun d-ro Panajot Hitrov, kun Atanas D. Atanasov (ADA), kun Asen Grigorov, Hristo Gorov, Ivan Esperov, Atanas Lakov, prof. d-ro Stojan Guĝev, Nikola Aleksiev, B. Oktomvrijski kaj kun multaj samideanoj-alilandanoj, kiujn mi persone konis.

Kara rememoro por mi estas mia renkontigo kun Lidia Zamenhof en 1929 dum la 21 UK en Budapeŝto. Ni interkonatiĝis ĉe iu ĝiketo en la Nacia Banko, kie ni ŝanĝis valuton. Eksciinte, ke mi estas bulgario, ŝi unua ekdeziris konatiĝi kun mi. Ni sidis sur iu benko, atendante nian vicon por monŝanĝo, kaj inter-

parolis amike. Si multe interesiĝis pri Bulgario kaj petis min rakonti pri mia patrolando. „Bedaŭrinde estas — ŝi diris — ke la gazetoj en Eŭropo nenion favoran skribas pri Bulgario, sed mi scias de mia patro d-ro L. Zamenhof, ke la bulgara popolo estas bonkora, laborema kaj gastama, ke la simpatiantoj de Esperanto en via lando estas multnombraj kaj vigle aktivadas per kaj por Esperanto. . .“

Granda estis mia ĝojo konatiĝi kun la filino de la Majstro kaj por mi estis fiero, ke ŝi ekinteresiĝis pri nia lando, pri nia popolo kaj esprimis tiom favoran opinion, influite de sia eminenta patro — la altestimata d-ro Esperanto.

IVAN VASILEV,
E-veterano el Pazarĝik

PENSIGA MOMENTO EN LA POEZIO DE D-RO L. L. ZAMENHOF

En la poemo „Preĝo sub la Verda Standardo“ Zamenhof prezentas la homaranisman doktrinon en versoj. Tiu poemo formis la finon de lia unua kongresparolado en 1905. En la jaroj 1906 kaj 1907 Zamenhof konsentis, ke oni forstreknu la homaranismajn tekstojn, sed en 1905 li firme rezistis kaj ne cedis elimini tiun poemon el sia kongresparolado. Kaŭze de tiu Zamenhof'a malcedemo Louis de Beaufront kaj Balif, gvidaj francaj esperantistoj, fakte rezignis partopreni la I-an UK de Esperanto en Bulogne-sur-Maire, sed ne „pro malsano“ kaj „pro ofica okupiteco“.

Zamenhof tre ŝatis tiun poemon. Satis ĝin ankaŭ ĉiuj poeziemaj esperantistoj, eĉ nun ne malpli ol iam, antaŭ ok jardekoj, kiam ĝi estis ĵus lanĉita.

Kio estas la sekreto de ties ĉarmo? Certe ne tio, ke ĝi estas parte religienhava, homaranisma. Eble tio, ke ĝi simbolas justecon kaj fraŭtecon inter la popoloj. Tute certa estas nur tio, ke dank' al iu deflankiĝo (ĉu intenca aŭ hazarda?) Zamenhof sukcesis muldi unu el plej altvaloraj perletoj de la originala Esperanto-poezio. Temas pri la lastaj kvar versoj de la kvina strofo:

„Ni inter popoloj la murojn detruos
kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
ekregos sur tero.“

La metodo pri efektivigo de la hilelismo-homaranismo¹ estas evolucia: „iom post iom“², „nerimarkite kaj sen ia rompado“³, „nerimarkite kaj sen rekte detruiri“⁴, „nenion rekte de-

truis“⁵, tamen post longa laboro, en daŭro de „multaj jarcentoj“⁶, eĉ de jarmiloj.

Al tiu evoluisma metodo Zamenhof dediĉis sian belegan poemon „La Vojo“. La esprimoj kiel „paŝo post paŝo, post longa laboro“ aŭ „eĉ guto malgranda konstante frapanta, traboros la monton granitan“, same kiel la antaŭaj evoluismaj esprimoj precize spegulas la mondkoncepton de Zamenhof pri disvolvo de la socio. Se ĝuste tiu ĉi metodo estus aplikita por forigi la murojn inter la popoloj, oni devus malmasoni ŝtonon post ŝtono, brikon post briko, sen rekte detruiri, sen ia rompado, sed en daŭro de multaj jarcentoj la limmuroj inter la nacioj kaj ŝtatoj malaperus nerimarkeble, sen bruado, sen krakado. Tio estas la evoluisma metodo.

Tamen en la supre citita kvarversa duonstrofo Zamenhof iras laŭ vojo nekutima por li mem kaj aplikas alian, tute kontraŭan al homaranismo metodon. Tiu nova metodo aludas, ke la konstruantoj de la unueca homaro rapide kaj energie subfosas la murojn inter la popoloj kaj tiujn faligas samtempe per surdiga krakado-bruado. Tiu urĝa laborritmo memorigas pri la farata revolucio.

Denove: ĉu hazarde aŭ intence, ĉu erare aŭ konscie Zamenhof enmasonis en tiu ĉi religipatosa poemo revolucion, en certa senco, poeziperleton?

Por pli bone orientiĝi pri la problemoj ni revenu al la historia epoko, en kiu ĝi estas verkita. Estis 1905: la komenco de la eksplozinta kontraŭimperiisma revolucio en Rusio (1905—1907). Resumante la rezultojn el la

agado dum 1905 V. I. Lenin ne sen emocio pentris la bildon de kolosaj ŝanĝoj: „En la printempo de 1905 nia partio estis unuigo de subplankaj rondetoj; en la aŭtuno ĝi fariĝis partio de milionoj da proletoj“⁷.

Estas konforme al la cirkonstancoj supoz, ke tiu etoso de revolucia optimismo atingis, kaptis kaj inspiris la aŭtoron de „Preĝo sub la Verda Standardo“. Por la unua fojo en sia vivo tiu komprenis, ke soci-evoluo konsistas ne nur el evolucio (sur kiu sin bazas la homaranismo), sed ankaŭ el revolucio.

Tiu mia konkludo ne estas banala sugesto, sed vitala ekzemplo pri progresema metamorfozo, kiu komenciĝis en la mondkoncepto de Zamenhof. Alia argumento, ke en Zamenhof aperis ĝermo de tute nova mondkoncepto estas lia kongresparolado ĉe la II UK de Esperanto en Genevo (1906): „Sinjoroj, kaj sinjorinoj! Ĉe la malfermo de nia kongreso vi atendas de mia parolado; eble vi atendas de mi ion oficialan, ion indiferentan, palan kaj senenhavan, kiel estas ordinare la oficialaj paroloj. Tia n parolon mi tamen ne povas doni al vi. Mi ĝenerale ne amas tiajn parolojn, sed precipe nun, en la nuna jaro, tia senkolora

oficiala parolo estus granda peko de mia flanko. Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la rajto de homoj“⁸.

Pri la daŭro kaj kresko de tiu nova mondkoncepta tendenco ĉe Zamenhof oni povus legi ankaŭ aliloke⁹.

NOTOJ

- ¹ Homaranismo — politika-religia doktrino iniciata de Zamenhof, por servi kiel ponto inter liberpensuloj el ĉiuj komunumoj.
- ² Hilelismo — unua formo de la homaranismo.
- ³ Joh. Dietterle (red.): Originala Verkaro de L. L. Zamenhof, Leipzig, 1929, p. 353, p. 327, p. 374.
- ⁴ (L. Zamenhof): Dogmoj de Hilelismo, St.-Peterburgo, 1906, p. 23.
- ⁵ (L. Zamenhof): Homaranismo (Hilelismo), St.-Peterburgo, 1906, p. 2.
- ⁶ G. Waringhien (red.): Leteroj de L. L. Zamenhof, vol. I, Paris, 1948, p. 203.
- ⁷ Same, p. 201.
- ⁸ V. I. Lenin: Plena Verkaro, kvina ruslingva eldono, vol. XVII, Moskvo, p. 145.
- ⁹ Noto 1, p. 396.
- ⁹ „Paco“, organo de la MEM-Sekcio de GDR: a) por la jaro 1981, p. 34—35; b) por la jaro 1982, p. 34—38.

CANKO_MURGIN

Esperantotur Internacia

La Deklaracio de Manila donas al la pledoj por la Internacia Lingvo en la turismaj medioj la necesan moralan aŭtoritaton. Ĝi faciligas nian laboron kaj kontaktojn kun la naciaj, regionaj kaj lokaj turismaj oficejoj kaj eĉ kun la diversaj turismaj entreprenoj kaj pravigas niajn petojn koncerne:

— publikigon de artikoloj pri Esperanto en turismaj fakrevuoj

— eldonon de filmoj, kasedoj, gvidlibroj, afiŝoj kaj faldfolioj en Esperanto

— utiligon de Esperanto por trafikhoraroj kaj informado

— malfermon de kursoj por lernado de la Internacia Lingvo ĉe turismaj faklernejoj kaj ĉe superaj turismaj institutoj kaj fakultatoj.

Laŭ sugesto de la UEA-prezidanto de la Eŭropa E-Centro en Bruselo, antaŭ tri jaroj komenciĝis kunordigaj klopodoj por la Eŭropa Esperanto-Turismo.

Bazo de la klopodoj estis la teorio de karuselvojaĝoj planitaj antaŭ deko da jaroj de la nederlandano Hans Bakker—honora membro de Monda Turismo.

La karuselvojaĝoj permesas intereŭropajn sendevizajn pacajn dialogojn kaj realigadon de la bazaj elementoj de la Esperanto-Turismo, nome:

1. Oferti al esperantistoj avantaĝajn vojaĝojn

2. Oferti Esperanton kiel utilan instrumenton al la turismaj instancoj tutmondaj

3. Pruvi la valoron de Esperanto dum vojaĝoj en kadre de amaturismaj aranĝoj.

La karuselvojaĝoj ekfunkciis jam kun Pollando kaj Hungario kaj pruvis, ke la teorioj praktike estis realigeblaj.

Ni speciale akcentu, ke la karuselvojaĝoj permesas translimajn vojaĝojn de la esperantistaro, efektivigante la kunvojaĝadon de plej diversaj kulturaj grupoj, kiuj ŝatas la renkontojn. Krome ili estas utiligataj por transporto de materialoj necesaj por la Esperanto-movado de la vizitataj landoj.

En la fino de septembro Esperantotur — Bruselo faris kontakton kun la Internacia Esperanto-Kursejo (IEK) en Bulgario. Tiel realiĝis tria ŝtupo en la kunordigado de la Esperanto-turismo.

La kontrakto rilatas sep specifajn programojn de IEK: 34 unusemajnaj restadoj en Pisanica kaj 15 dusemajnaj restadoj en Varna kaj Pisanica por entute proksimume mil personoj.

Speciala klopodo estos farata en kadre de la 36-a IFEF-kongreso en la bulgara somerrestadejo „Suna Bordo“ ĉe la Nigra Maro.

LEO DE BRUYNE,
Belgio

FLAMA POETO DE LA REVOLUCIO



Smirnenki komencis verki tre frue, sed kiel proleta poeto li formigis post 1918, kiam li komencis kunlabori al la satira organo de la Bulgara Komunista Partio „Ĉerven smjaŝi“ (Ruĝa Rido). Per sia ciklo pri la viktimoj de l'kapitalisma urbo („La fratetoj de Gavroŝ“, „La maljuna muzikisto“, „Florvendistino“ ka) li altiras la atenton de la vasta leganta publiko. Ne kontentigante nur senmaskigi la maljustan socian vivordon, la poeto revas pri revolucia ŝanĝo de la socio. En sia unua verskolekto „Estigu tago!“ (1922) li kreas majestan bildon de la alproksimiĝanta revolucia tempesto. Jen kion skribis lige kun ĝia apero la eminenta literatura kritikisto-komunisto Georgi Bakalov: „Sur la strato de la proleta poezio ekestis festa tago. Juna, freŝa, sukplena talento, en la kapturita bunteco de siaj originalaj koloroj kaj bildoj, kiuj elŝprucas kaj diseriĝas simile al fajra kaskado, alportis tiun ĉi ĝojon per sia verskolekto „Estigu tago!“. Poezio portanta mal-kaŝe klasan karakteron, en tioma grado, ke ĝi povas prave esti nomita poezio partia, poezio proleta“.

Sur la formadon de la soci-politikaj konceptoj de Smirnenki tre forte influis la Granda Oktobra Socialisma Revolucio. Li estis inter la unuaj bulgaraj poetoj, dediĉintaj al ĝi vicon da emociplenaj versaĵoj: „La ruĝaj eskadronoj“, „Moskvo“ ka. „La ruĝaj eskadronoj“ aperis sur la paĝoj de gazeto „Ĉerven smjaŝi“ la 3-an de septembro 1920, preskaŭ tuj post la venka marŝo de la kavaleria armeo de Budjonnij, kiu en la somero de 1920 disbatis la intervenantojn.

La poezio de Smirnenki kunportas senton pri universaleco, pri internacieco, pri solidareco de la tutmonda proletaro. Liaj internaciaj verkoj („Johano“, „Rosa Luxemburg“, „La morto de Defecluze“ ka.) havas grandegan poezion kaj politikan valoron, malgraŭ ke la eventoj estas jam delonge forpasintaj.

Malmultaj estas la poetoj kaj verkistoj, kiuj simile al Smirnenki, tiel spontane kaj forte respegulis la feran volon kaj la historian destinton de la klaso, kiu ilin naskis kaj nutris. Smirnenki unua en la bulgara

literaturo prezentas la laboriston kun konkretaj trajtoj, akcentante sur lian historian mision:

„Sub liaj pezaj paŝoj la granita urb'
ektremas kaj vekigas kun kolero,
kaj verŝas sian krion la surstrata bru',
la krion de la hom-mizero.

Tra l'frua matenruĝ' de l'nova tag'
alpaŝas li aŭdace kun solen'
kaj al la homa gento en obskur' kaj plag'
disĵetas fajrojn el ruben'.

(„La laboristo“)

La vivo de la poeto estis tragike mallonga kaj, kvazaŭ antaŭsentante sian proksiman finon, li verkis per mirinda inspiro kaj en daŭro de nur kvin-ses jaroj kreis poezion, kiu eniris la oran trezorejon de la bulgara literaturo.

Smirnenki estas la plej talenta proleta poeto de Bulgario. Liaj nuntempuloj nomis lin „bardo de la revolucio“, poeto de la fajraj kolharoj“, „suna poeto“, „infano de la suno“. . . Nun, kiam jam estas pasintaj 85 jaroj de lia naskiĝo, la tempo ne forprenis, sed aldonis brilon al lia poezia gloro.

ĤRISTO SMIRNENSKI

La fratetoj de Gavroŝ

Vi tuta el malico estas,
ho brua, diboĉanta urb' —
elektraj globoj viaj nur
brilantan lukson vane festas.

Ĉar ĉiun violetvesperon
malriĉa vagas infanar'
kun la ofendo kaj sufero
sur larmoplena okulpar'.

Vi kion donas el trezor',
al tiuj tiel malavara
kaj al infanoj de l'sklavaro
kruela de plej frua hor'?

Sort' ilin trompis sen kompatato,
viv' kaptis ilin en la ret'
kaj jen — staradas sur la strato,
okulojn kaŝas la kasked'.

Ĉe viaj belvitritinoj lumaj
ekstaras ili en grupet' —
kun kia suferado fulmas
okuloj febraj en sekret'.

Sed hejmen reekiras ili,
sopiras time la buŝet'
kaj tiuj belvitritinoj brilas
per tiom ĉarma la objekt'.

Vi tuta el malico estas
ho brua, diboĉanta urb' —
elektraj globoj viaj nur
brilantan lukson vane festas.

1921

Tradukis: IVAN DOBREV

MEMORE AL ALEKSANDĀR ĴENDOV

(Lige kun la 30-jara datreveno de lia forpaso)



Inter la lertaj majstroj de la peniko, plumo kaj ĉizilo, disfamigintaj la gloron kaj talenton de la bulgara genio ekster la landlimoj de Bulgario kaj postlasintaj senmortajn ĉefverkojn en la nacia trezorejo de la pentra kaj plastika arto, en la avangardaj vicoj elstaras per sia grandioza staturo Aleksandār Ĵendov — unu el la pioniroj kaj plej eminentaj kreintoj de la nuntempa bulgara karikaturo, grafiko, beletro, satiro kaj publicistiko, unu el la ĉarmaj kaj originalaj konstruantoj de la popola kulturo en hodiaŭa socialisma Bulgario.

Ne nur per sia enciklopedia praktika agado, sed ankaŭ kiel sperta konanto de la mondaj arto, literaturo, historio kaj kulturo A. Ĵendov prezentas neordinaran artkreatan personecon.

Multjara kaj riĉa estas la historio de lia familio, kiu laŭ patra linio devenas de Kotel — unu el la fortikaĵoj de spirito kaj patriotismo dum la bulgara Renesanco.

Aleksandār Ĵendov naskiĝis en Sofio en unu el la kvartaloj de malriĉeco — Juĉbunar, kvartalo de gloraj progresemaj tradicioj kaj revoluciaj bataloj. Tio ja ne estas hazardaĵo. En la sama kvartalo vivis kaj agis dum pluraj jaroj la granda filo de Bulgario Georgi Dimitrov. Tie ĉi vivis kaj verkis dum la matura periodo de sia mallonga vivo la inspirita bar-

do de la proleta revolucio Ĥristo Smirnen-ski.

La juneco de Aleksandār Ĵendov pasas sub la signo de kelkaj militoj: la Balkana, la Inter aliancana, La Unua Mondmilito kaj la Soldata Ribelo de Vladaja, la Granda Oktobra Socialisma Revolucio kaj la unua en la mondo popola ribelo kontraŭ la faŝismo — la glora Septembra Ribelo. Ĉiuj ĉi internaciaj kaj naciaj politikaj eventoj grave influas sur la mondkoncepton de la impresigema kaj batalpreta naturo de la juna kreanto, plifortigas lian revolucionan harditecon, lian kompatemon kaj amon al la homoj el la popolo.

La komencaj paŝoj en la kreovojo de Aleksandār Ĵendov estasigitaj kun la progresema semajna gazeto „Smjaħ i sālzi“ (Rido kaj larmoj), kie estas metita la komenco de granda kaj daŭra spirita kaj krea amikeco kun „la poeto de la fajraj kolharoj“ Ĥristo Smirnen-ski.

La du nedisigeblaj kreantoj kaj kamaradoj estas konstantaj atestantoj kaj partoprenantoj en la epopeaj socialaj bataloj de la Juĉbunara proletaro. Ili spiras kaj vivas en la magnete altiranta ilin vulkana atmosfero de la laboristoj-batalantoj. Kaj ili hardiĝas, ekirinte la danĝeran vojon de revoluciaj agoj.

Ĵendov kaj Smirnen-ski abnegacie ĉirkaŭprenas per entuziasmo kaj junula vervo la nevenkeblan doktrinion de la estonto — la marksimon-leninismom, kiu estiĝas kredo, senco kaj enhavo de ilia admirinda vivo kaj verkaro. Kaj ili okupas indan lokon inter la plej bonaj reprezentantoj de la nova socialisma kulturo.

Cerpante el la riĉa sperto de vico da eŭropaj skoloj de artoj, kulturo kaj sociaj bataloj — la aŭstra, la germana kaj antaŭ ĉio la sovetaj, li mem estiĝas unu el la novigantoj en la kampoj de socialisma realismo.

Portanto de nova estetiko, Aleksandār Ĵendov konas centojn da nomoj de reprezentantoj de la novaj tendencoj kaj direktoj en la eŭropa kulturo. Li konatiĝas kun grandaj kreantoj kaj ekposedas rimarkindajn krefarojn, kiuj fariĝas konataj en Bulgario nur post deko da jaroj. En Aŭstrio li renkontiĝas kun Silone. En Germanio li konis vicon da elstaraj reprezentantoj de la kulturo: George Grosz, Käthe Kollwitz, Piscator. Li estis en la medio de Bertold Brecht, renkontiĝis kaj interparolis kun France Masereel. Li persone konis ankaŭ Paul Vaillant Couturier. . .

Fine de la 20-aj jaroj Aleksandār Ĵendov estas en Moskvo kaj Leningrado kiel edukato

de la Supera Akademio de Pentroarto. La grandioza evoluo de la soveta kulturo estas la krea laboratorio de liaj artisma inspiro kaj multdirektaj kreaĵ manifestiĝoj.

En Sovetunio Aleksandăr Jendov aktivas en la medio de vico da eminentaj kreaĵoj: la poeto Vladimir Majakovskij, kun kiu lin ligas kelkara amikeco, la mondfamaj kinoreĝisoroj Eisenstein kaj Pudovkin, la verkistoj Ilf kaj Petrov, la profesoroj Favorskij kaj Moor, Kukriniksi, Boris Efimov, Deni, la konata publicisto Kolcov kaj multaj aliaj elstaraj majstroj de la plumo, peniko kaj art-parolo.

Reveninte en sian patrujon komence de la 30-aj jaroj, Aleksandăr Jendov disvolvas vastegan multflankan kreaĵoj socian agadon — tre gravan por la estonta evoluo de la bulgara socio. La aktualeco de lia arto kaj agado ludis en la 20-aj, 30-aj kaj 40-aj jaroj de nia jarcento gravan rolon por formado de l'spirita esenco de la nova homo. Ankaŭ hodiaŭ la problemoj, starigitaj kaj prilaboritaj fare de la antaŭvidema kreaĵoj emocias, inspiras, mobilizas la novajn kreogeneraciojn. Kaj tio faras lin nia nuntempulo kaj spirita, estetika kaj krea instruanto.

En la historio de la monda revolucia grafik-



Kontraŭsoveta milito

arto kaj satiro Aleksandăr Jendov estas unu el la plej lertaj majstroj, kreinta arton ne transiran, kun ekskluziva ideo kaj socia signifo kaj efiko.

STEFAN JENDOV

Internacia Literatura Konkurso de „BE“

Okaze de la glora 40-jara jubileo de la socialisma revolucio en nia lando (9. IX. 1944) kaj lige kun la venko super la faŝismo la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ anoncas Internacian Literaturan Konkurson.

Oni povas partopreni ĝin per: poezio (originala kaj traduka); prozo (nur originala) — rakontoj, rememoroj, legendoj; publicistiko (nur originala) — artikoloj, eseoj; kanto (kun propraj tekstoj kaj melodio aŭ nur melodio por tradukita teksto).

Ni rekomendas jenajn temojn por viaj verkoj:

I. La Patrolanda Fronto — organizanto kaj gvidanto de la batalo de la bulgara popolo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo.

II. La unueco de progresemaj fortoj de la bulgara popolo en la batalo kontraŭ faŝismo — komunistoj, agraranoj kaj progresema inteligentularo.

III. La soveta armeo — liberiginto de la popoloj elsub la sklaveco de faŝismo.

IV. Glorigo de pereintaj herooj en la batalo kontraŭ faŝismo.

V. La unueco inter Bulgara Komunista Partio kaj Bulgara Agrara Popola Unuiĝo en la batalo kontraŭ faŝismo kaj en la konstruado de socialisma socio en Bulgario.

VI. La gejunuloj — en la unuaj vicoj de la batalantoj por libereco kaj en la socialisma konstruado en Bulgario.

VII. La bulgaraj esperantistoj — aktivaj batalantoj kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo, konsciaj konstruantoj de la nova vivo en nia patrolando.

VIII. La bulgara E-movado — intime ligita kun la popola batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo kaj en la konstruado de nova socialisma socio.

IX. Bulgaraj esperantistoj-kontraŭfaŝistoj — elstaraj publicistoj, verkistoj kaj poetoj.

X. Esperanto serve al la nacia kulturo kaj arto dum la 40 jaroj de socialisma konstruado en Bulgario.

XI. La bulgaraj esperantistoj — ardaĵ batalantoj kontraŭ la minaco de nuklearnila milito, por defendo de la tutmonda paco.

XII. La bulgara juna E-generacio — inda posteulo de la revoluciaj tradicioj de la bulgara laborista klaso.

La konkurson rajtas partopreni bulgaraj kaj alilandaj esperantistoj. Ĉiu povas uzi nur unu pseŭdonimon kaj sub ĝi sendi ne pli ol du verkojn de ĉiu ĝenro kaj speco. Laŭ sia enhavo, stilo kaj grandeco ĉiu verko devas esti konvena por publikigo en nia revuo, do rakontoj estu ne pli longaj ol 6 tajpitaj paĝoj (po 30 linioj surpaĝe), rememoroj, legendoj, artikoloj kaj eseoj — ne pli ol 4-paĝaj.

La plej bonaj verkoj estos premiitaj kaj ankaŭ aperos en „BE“.

La konkurso estas anonima. Ĉiu tajpita konkursaĵo devas esti subskribita per pseŭdonimo. La veran nomon kaj adreson de la konkursanto oni skribu sur slipon, metu ĝin en koverteton kaj surskribu la koverteton per la pseŭdonimo. Tiun koverteton kaj konkursaĵon oni metu en grandan koverton kaj sendu ĝin al adreso:

Redakcio de „Bulgara Esperantisto“, bul. „Hristo Botev“ 97, BG-1303 Sofio, Bulgario (por la Internacia Literatura Konkurso).

Limtempo por sendi konkursaĵojn: la 30-a de junio 1984.


Samideanoj el ĉiuj landoj, partoprenu amase nian internacian literaturan konkurson!

„INSTRUISTOJ KAJ KAMARADOJ“

Ekzistas verkoj, kiujn oni tralegas kaj metas en la libroŝrankon. Ekzistas tamen verkoj, kiujn oni ofte relegas. Al la lastaj apartenas la rememoroj kaj skizoj, kies aŭtoro estas la sociaganto kaj honora prezidanto de MEM kamarado Nikola Aleksiev.

Dum la dudekaj jaroj la sciavida junulo elektis al si vojon, kiu kondukis al policejoj kaj juĝejoj, al la prizonoj en Burgas, Haskovo, Plovdiv kaj Sliven.

Kiel gimnaziano en urbo Dupnica (nun Stanke Dimitrov) al li faris fortan impreson la instruistino, de historio Mara Ikonomova. Si ne nur instruis, sed samtempe estis konsultantino pri bonaj agoj. Li dediĉis al ŝi pagojn, kiuj priskribas ŝin kiel patrino, instruistino kaj komunistino.



Multaj belaj pagoj estas skribitaj pri personecoj, kiuj sindone laboris por la socia progreso en nia lando — pri la mondkonata revolucio Georgi Dimitrov kaj pri aliaj funkciuloj de la bulgara laborista movado — Jordan Milev, Dragoj Koĝejkov, Asen Bojaĝiev, Avram Stojanov. . .

La aŭtoro priskribas homojn, kiuj ŝatis la vivon, kredis je ĝi; li prikantas liberamajn,

kuraĝajn, aŭdacajn, celkonsciajn personecojn, kiuj ne timis obstaklojn, prizonojn kaj kuglojn — Zahari Georgiev, Anuška Dragieva, Nikola Botuŝev.

La aŭtoro rememoras pri la digna pacbatalanto akademiano Georgi Naĝakov. Li rakontas pri majstroj de la beletristiko kaj politika publicistiko — Dimitar Dimov, Enĉo Stajkov, Jak Natjan — homoj penetritaj de grandaj idealoj, kies devizo estis „Verkisto kaj civitano samtempe“.

Liaj instruistoj kaj kamaradoj estis strebantoj al homa feliĉo, al justa sociordo, homoj de morala puranimeco.

Kun granda amo li rakontas pri avino Maria Dragieva. Ĉiuj ŝiaj filoj kaj filinoj partoprenis la kontraŭfaŝisman batalon. Laŭ siaj fortoj ŝi helpadis ne nur al siaj infanoj, sed al ĉiuj kamaradoj, kun kiuj ŝi kontaktis. Ŝi renkontis la liberon kun nigra tuko sur la kapo: pereis ŝia amata Anuška, pereis la filo Petro. . .

La aŭtoro rakontas pri personecoj, en kiuj li vidas enkorpiĝon de la veraj idealoj. Kuraĝo, sinofero por la popolo — jen ilia ĉarma trajto.

Inter la personecoj, kiujn la aŭtoro priskribas verve, estas ankaŭ kelkaj esperantistoj — Angel Petkov — Anĝelo, Nikola Botuŝev kaj Trifon Hristovski, ne vidintaj la aŭronon de la libero.

Dum longaj jaroj li kunlaboris kun sovetianoj S. Podkaminer, K. Gusev kaj kiel lenta ĵurnalistino pentras iliajn noblajn trajtojn koncize, per malmultaj vortoj, sed esprime plene.

Rakontante pri la pasinteco, Aleksiev majstre transiras al la nuntempo, tuŝas aktualajn problemojn, faras komparojn.

Traleĝinte la libron, oni enskribas en sian memoron nomojn de revoluciuloj, sociagantoj, verkistoj, de ordinara homoj, sed tiaj kun altaj idealoj en la koro.

Oni devas nur bedaŭri, ke la libro fariĝis raraĵo tuj post ties apero. Oni devas ĝin reeldoni, por ke pli da legantoj eksciuj, kiaj idealistoj vivis kaj batalis por paco kaj nova sociordo. Ni esperu, ke en eventuala nova eldono la skizoj pri la esperantistoj aperos en Esperanto-traduko.

31-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

De la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto j.k. en Budapeŝto okazis la 31-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE). Ĝin partoprenis 183 geesperantistoj el 19 landoj. Pli ol la duono de ili estis blindaj esperantistoj el la socialismaj landoj en Eŭropo. Plej multnombraj estis la grupoj el Bulgario kaj Pollando.

La hungaraj dommastroj organizis tre interesan kaj utilan kongresan programon.

Tiu ĉi kongreso montris la grandan estimon al blindaj esperantistoj el la socialismaj landoj. Du membroj de LIBE-estraro — la vicprezidanto kaj la sekretario estas el Jugoslavio. La kongreso unuanime elektis kiel sian prezidanton Antalioj Masenko. Kvar el ĉiuj ses kongresaj raportoj estis faritaj de reprezentantoj de socialismaj landoj — du el Bulgario (Ĵelev), unu el Sovetunio (Ĵukova) kaj unu el Hungario (Kiŝ). Kiel membroj de la komisiono por celebado de la 100-jariĝo de Esperanto estis elektitaj nur reprezentantoj de socialismaj landoj: Pollando, Sovetunio, Jugoslavio. La nova libra fonduso de LIBE ricevis la nomon de la mondfama blinda rusa sovetia esperantisto-poeto kaj pedagogo Vasilij Eroŝenko.

Unuan fojon en la historio de la E-movado de nevidantoj, dum la kongreso okazis kunsido de blindaj esperantistoj el socialismaj landoj. Inicijatoj estis la bulgaraj partoprenintoj. La kunsido pritraktis du demandojn:

— Por starigo de pli intimaj kontaktoj por komuna agado estis esprimita la ideo pri partopreno de reprezentantoj de organizaĵoj de nevidantaj esperantistoj en la Konsultigoj de E-organizaĵoj el socialismaj landoj.

— Por normaligo de la membreco de nevidantaj esperantistoj el socialismaj landoj en LIBE la naciaj E-organizaĵoj devas helpi. Tio kontribuos por pli vasta propagando de la althumana sociala politiko en la socialismaj landoj.

Dank' al la helpo de la bulgara Internacia Esperanto-Kursejo bulgaraj esperantistoj unuafoje partoprenis organizite la kongreson. La oficiala salutletero de CE de BEA estis, akceptita kun granda intereso kaj atento de ĉiuj ĉeestantoj. La agado de la bulgaraj nevidantaj esperantistoj estis alte pritaksita.

La sekva IKBE okazos en Italio en junio 1984.

VLADIMIR JELEV

Laŭ iniciato de bulgaraj esperantistoj la komerca produktadentrepreno „Globus“ en Plovdiv produktis eksperimentan serion de la cigaredoj „Antitab“. Tio estas kuracherbaj cigaredoj, kiujn oni uzas kontraŭ tabakfumado. Nur 200 cigaredoj sufiĉas por unu kuracperiodo. Ili faras la fumadon malagrabla kaj netolerbla por fumanto. Eksperimenta grupo, konsistanta el 100 fumantoj, pruvis la kuracan efikon, kiun havas cigaredoj „Antitab“. Post fino de la kuracperiodo 94 membroj de la eksperimenta grupo tute ne havis deziron plu fumi kaj rezignis la tabakfumadon; 4 personoj plu deziras fumi nur kiam ili estas inter fumantoj kaj tiaokaze uzas cigaredojn „Antitab“; 2 personoj ne atingis la deziratan celon. Jen kelkaj opinioj de fumantoj pri la cigaredoj „Antitab“:

„Jam 30 jarojn mi fumis po 10—15 cigaredojn tage. Multfoje mi provis rezigni la fumadon, sed malsukcese. Mi komencis per „Antitab“ kiel surrogaton. Nun mi tute ne sentas bezonon fumi.“

„Mi estis pasia fumanto. „Antitab“ mi fumis nur unu semajnon, sed tio sufiĉis. Baldaŭ mia memsento plibonigis kaj la apetito kreskis.“

Profesoro Pejĉo Pejĉev, kreinto de „Antitab“, jam prilaboris kelkajn novajn variantojn de sia recepto kaj aldonis pli agrablajn aromajn ingrediencojn.

En septembro 1983 entrepreno „Globus“ komencis serian produktadon de la novspecaj kuracherbaj cigaredoj „Antitab“.

ANNA SOTIROVA

TURISTA E-RENKONTIGO EN DRJANOVO

La 17-an kaj 18-an de septembro k.j. en la historia Drjanovo-monaĥejo okazis la Unua Turista E-Renkonto „Drjanovo'83“. La arango estis organizita de la urbaj estraroj de turista societo „Baĉo Kiro“, de la Komitato pri Pacdefendo kaj E-societo „Ivan Vladkov“.

Sabaton vespere oni pasigis agrablajn horojn de interkonatiĝo kaj amuzo. La partoprenantoj en la renkonto akceptis Alvokon al la turistoj-naturamiko kaj esperantistoj por aktiva paco batalo.

Okaze de la Monda Turisma Tago — la 27-a de septembro, oni sendis sincerajn salutojn al turistoj kaj esperantistoj kun alvoko „Por turismo — sub pacherizontoj!“

DIMITAR MUTUŜEV

MARŜO DE ESPERANTISTOJ-TURISTOJ

Ci-somere E-societo „Esperanto triumfonta“ — Petriĉ, okazigis en Pirin-montaro la III Nacian Turistan Marŝon. Partoprenis E-turistoj el Jambol, Velingrad, Varna kaj Petriĉ. La marŝon kompetente gvidis Merita Aganto de Turismo Ivan Apostolov, prezidanto de la E-societo en Petriĉ.

La grupo ekveturis per aŭtobuso el urbo Kresna al loko Volovarnika. Poste ĉe senĉesa pluveto komenciĝis kelkhora suprenirado al rifugejo „Sinanica“. Fakte tio estis la plej peniga etapo. Sekvis vojoj laŭ jena itinero: montodomo Vihren — montodomo Demjanica — ŝirmejo Tevnoto Ezero — montodomo Pirin — urbo Melnik.

La partoprenantoj en la turista marŝo ricevis neforgeseblajn impresojn de Sinanica-montokresto kun la marmoraj cirkoj, de la lagoj Sinaniŝko, Georgiŝko kaj Vlaŝniŝko, de ravantaj vidaĵoj de Suda Pirin-montaro.

K. ĤLEBAROV

En urbo Orjaĥovo okazis Esperanto-renkontigo, iniciatita de la loka E-societo „Georgi Stanev“ kaj dediĉita al la glora, unua en la mondo, kontraŭfaŝisma perarmila ribelo en Bulgario. La renkontigon partoprenis kelkdekoj da esperantistoj el Ruse, Sumen, Miĥajlovgrad, Plovdiv, Bjala Slatina, Kneĵa, Vraca kaj aliaj lokoj.

La ĉeestantoj metis florkronon ĉe la monumento de la pereintoj por popola libero. Post la parolado de la reprezentanto de la Centra Estraro de BEA — Ivan Keremidĉiev-Esperov la ĉeestantoj per unuminuta silento honoris la gloran memoron de la pereintaj batalantoj. Poste, en la Domo de la Junularo, la renkontigo estis solene inaŭgurita de sino Venka Raškova. La prezidantino de la Komunuma Komitato de la Patrolanda Fronto—Hrizantema Raŝeva, kiu aktive kunhelpis la organizadon de la E-renkontigo, parolis pri la heroo pasinteco kaj la nuna socialisma prospero de Orjaĥovo. La prezidantino de la E-societo en Orjaĥovo Nadeĵda Bosaŝka parolis pri la historio de societo „G. Stanev“, pri ĝiaj sukcesoj. La reprezentanto de CE de BEA salutis la iniciaton kaj proponis, ke ĝi okazu tradicie ĉiujare por la apudnubaj kaj proksimaj E-societoj, ke en ĝi estu invitataj ankaŭ esperantistoj el apudnubaj landoj, des pli, ĉar tie ĉi estas ankaŭ la fama insulo „Esperanto“. En tiu senĉo parolis ankaŭ aliaj ĉeestantoj.

Poste ĉiuj trarigardis la aranĝitan en la Junulara Domo ekspozicion de peresperantaj korespondadoj — bildkartoj kaj kovertoj, infanpupoj, suveniroj k.a. La granda grupo vizitis la urban muzeon kaj ekskursis al la ruinoj de kastelo „Kamaka“ (La ŝtono) kaj gastis al insulo „Esperanto“, kie oni kantis, dancis kaj fotografiĝis.

NADEĴDA BOŜAŜKA
IVAN KEREMIDĈIEV

„KARANDILA—83“

Ci-aŭtune la turistoj-esperantistoj el Orienta Bulgario duafoje kolektiĝis en la sino de legenda hajduta Balkano apud Sliven. Post trarigardo de la muzeo de la senmorta vojevido Haĝi Dimităr en Sliven, la E-grupo supreniĝis per telfero ĝis la loko „Karandila“ — Orienta Balkan-montaro.

Oni trovis dormeblecon kaj gastamon en la ripozdomo de uzino „Georgi Dimitrov“. La sekvan tagon ĉe sunvetero okazis promenoj tra belaj lokoj de la montaro.

La turista E-renkontigo „Karandila — 83“ akceptis alvokojn: al Monda Organizaĵo pri Turismo — Madrid — proponante, ke oni daŭrigu la klopodojn utiligi Esperanton por praktikaj celoj fare de la oficialaj turismaj organizaĵoj; al Stata Komitato pri Turismo — Sofio — rekomendante, ke estu eldonitaj en Esperanto prospektoj kaj aliaj materialoj pri la turismaj eblecoj de Bulgario.

De BEA kaj ties turista sekcio oni postulas pli regulajn informojn al la turistoj-esperantistoj rilate la internacian turismon kaj Mondan Turisman Tagon. La Distriktaj kaj Societaj Estraroj de BEA estas alvokitaj, ke ili pli regule organizu internaciajn ekskursojn, vizitojn al historiaj lokoj, trarigardon de kulturaj monumentoj kaj aliajn iniciatojn, dum kiuj oni parolos nur Esperanton.

D. MUTUŜEV

Enkadre de la 68-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto je la 4-a de aŭgusto 1983 estis fondita internacia organizaĵo de filozofoj-esperantistoj — Filozofia Asocio Tutmonda (FAT). Ĝi celas kontribui por korekta pensado de la homoj, por la internacia kultura kunlaboro, por solvo de problemoj de la logiko kaj scienca metodologio, kaj aparte por klarigo de la filozofiaj bazoj de la interlingvistiko kaj internacia E-movado.

En la fonda kunveno partoprenis filozofoj, sciencistoj, ŝatantoj de la filozofio el Hungario, Sovet-Unio, Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Rumanio, Italio, Francio, Britio, Brazilo, Meksikio, Ĉinio, Hinda Unio k.a. Prezidanto de FAT oni elektis profesoron Evaldo Pauli (Brazilo).

La ideo pri fondiĝo de FAT naskiĝis en 1981 en Brazilo. En 1983 aperis du kajeroj de la eldonata en Brazilo filozofia E-revuo „Simpozio“ (ĉefredaktoro prof. Evaldo Pauli). Ili enhavas materialojn pri la mondkoncepto kaj kreadaj kontribuadoj de L. L. Zamenhof, Renè Descartes, L. Beethoven, Parmenides, Boëtius, K. Jaspers, K. Marx. La kajeroj entenas ankaŭ materialojn pri la filozofio de la E-movado, pri la unua filozofia E-vortaro (Stanislav Kamarit, Ĉeĥoslovakio, 1934) ka.

Mi alvokas la bulgarajn esperantistojn, interesigantajn pri la problemoj de la filozofio, historio de la filozofio, logiko kaj metodologio de la scienco, etiko, estetiko, metodologiaj bazoj de la interlingvistiko kaj internacia kultura kunlaboro, kontaktigi kun mi por fondi sekcion de la bulgaraj filozofoj-esperantistoj ĉe BEA. Adreso: Doc. Cvetan Kardaŝev, str. „Pordim“ 8, BG-1202 Sofio.

CV. KARDAŜEV

ESPERANTISTOJ-KANTEMULOJ, ATENTU!

Sofia Esperanto-Ĥoro
serĉas

forestajn ĥoristojn el la tuta lando!

MUZIKINSTRUISTOJ,
MUZIKSTUDENTOJ,
AMATOROJ,

kiuj povas kanti laŭ notoj kaj posedas belan voĉon:

SOPRANO

ALDO

TENORO

BASO

Sendu tuj kasedon kun plenumitaj de vi kantoj kaj priskribon de via agado kiel esperantisto kaj ĥoristo laŭ jena adreso:

Sofia Esperanto-Ĥoro (por la konkurso).

ul. Milin kamak 58, 1421, Sofio.

La aprobitaj de speciala ĵurio ĥoristoj ricevos regule kaj senpage la notojn de la kantoj kaj periodo kolektiĝos en Sofio por provkantado antaŭ koncertoj.

SOFIA E-ĤORO

E-EKSPOZICIO ORGANIZOTA EN USSR

La geesperantistoj el urbo Niĵnevartovsk organizas poresperantan ekspozicion. Ili petas ĉiujn gesamideanojn sendi porpacajn materialojn, afiŝojn, fotojn, sondiskojn laŭ jena adreso:

SU 626 440, Tjumenŝkaja obl.

Niĵnevartovsk, str. Omskaja 12—3

Esperanto-klubo.

LA SATOKUPO — FONTO DE SPIRITA RIĈIGO

Ĉiu homo diversmaniere utiligas sian liberton depende de la interesoj kaj ŝatokupoj. Grandega estas la kontenteco pri la ŝatata okupo, per kiu la homo spirite riĉiĝas.

Gustatempe oni devas malkovri kaj kuraĝigi la bonajn ŝatokupojn. Aparte grava estas tiu momento por la gelernantoj, kiam ili formiĝas kiel personecoj. La libertempo ne devas esti perdata sencele.

Kiamaniere mi interesigas la gelernantojn lerni Esperanton?

Komence mi konigas al ili la problemon pri internacia lingvo. Pere de mia propra E-korespondado mi pruvas, ke per Esperanto ili havos amikojn en la tuta mondo. Ili ekscios pri la vivo, pri la popolkutimoj, pri la kulturaj valoroj de aliaj popoloj. Efektive, Esperanto estas fenestro al la mondo.

Preskaŭ ĉiuj gelernantoj kolektas ion. Mi donas al ili tian korespondeblecon. Mi sendis leterojn kun korespondpetoj al Japanio kaj Hispanio kun la adresoj kaj ŝatokupoj de miaj gelernantoj. Mia leteramiko el Estonio sendis adresojn de siaj E-gelernantoj kun indiko de la hobiaj. La gelernantoj el mia fakultativa E-klaso sendis leterojn kaj jam ricevis respondojn el Estonio.

Praktiko en mia E-instruado estas la lernado de E-kantoj kaj -versaĵoj. Tiamaniere la gekursanoj plej facile kaj agrable lernas novajn vortojn kaj gramatikajn. Stimulo por rapida parkerigo de la kantoj kaj versaĵoj estas partopreno en belartaj programoj — Zamenhofaj vesperoj en lernejo „T. Karpinskaja“ kaj en E-societo „Verda Torĉo“ — Gabrovo, celebros de Internacia Virina Tago, E-renkontiĝoj en ripozdomo „La Siringoj“ kaj en Drjanovo-monaĥejo k. a.

Kun granda deziro ni preparis kaj faris surbendigon de priesperanta disaŭdigo por radioelsendo en Gabrovo la 21-an de januaro 1983.

Mi disdonis al la gelernantoj libretojn „Anekdotoj pri gabrovanoj“ Tiamaniere en la klaso kaj en la libera tempo ili lernas novajn E-vortojn kaj -frazojn en teksto, kiu estas konata bulgarlingve.

SONJA TIHOVA

NIAJ PERANTOJ

Britio. S-ro Paul Hewitt, Highfield Road, North Thoresby, Grimsby, South Humberside DN 36 5 RT
Jarabono: 2,50 f. ster.

Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS 110 00 Praha 1

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

S-ro Daniel Papak, Šmermova 35/1, CS-04001, Košice

Danlando. S-ro J. H. Erikson, Torholmsvej 26, DK-9800 Hjørring Postkonto: 771.77 R.

Jarabono: 38 kr.

Federacia Respubliko Germanio: S-ro Roland H. Hegen, Schlossgasse 30, D-6738 Elmstein.

Jarabono: 8 DM

Finnlando. Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 Kuopio 10

Jarabono: 24 fmk.

Francio. S-ro Roger Degrelle, B. P. 23, Nancy, F-54510 Tomblaine.

Girkonto: 771.77 R

Jarabono: 20 ff.

Germana Demokratia Respubliko. Esperanto-Asocio de GDR, Charlottenstr. 60, 108 Berlin

Hispanio. S-ro Adonis Gonzalez Meana, C. Marc. Gonzalez 5—4^a dcha., Gijon (Oviedo).

Jarabono: 300 pesetoj.

Hungario. „Budapeŝta Informilo“, p. k. 153, H-1443 Budapest.

Jarabono: 60 forintoj.

Japanio. S-ro Yoshiaki Mizuno, 327, Kitairiso, Sayama-shi, Saitama-ken 350-13.

S-ro Nanba Syozi, Hiruiti 3-13-26, Zyoto-ku, Osaka 536

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Kubo. S-ro Pedro P. Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.

Madagaskaro. S-ro Justin Randriamampionona, Lot: VA 20BA Tsiadana, 101, Antananarivo.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Malto. S-ro Anthony Mercieca, 20, Valleta Road, Qormi.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Pollando. S-ro Lech Kosienak, ul. Pekna 16 b/g PL-00539 Warszawa

Portugalia. Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto, 6 R/C A, P-1500 Lisboa.

Jarabono: 260 esk.

Sovet-Unio. Alar Kihn, str. Hiin 5—5 SU-200016 Tallin, Estonio.

Jarabono: 5 rubloj.

Svedio. S-ro Tord Suard, Lingvägen 201, S-12359 Farsta.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Usono. S-ro Roy McCoy, 371, Harvard Street Cambridge, Mass. 02138.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Vjetnamio. Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107 Quan Thanh, Hanoi.

F-ino Vũ Thanh Huong, 20 Ly Thai To
Vien Ngon ngu hoc, Hanoi.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVSANSKI, Dimitar ĤAĜIEV, Krăstju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodio“ — 1 grado. Eldonkvanto 6500

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,

P. K. 68

1303 Sofio, Bulgario

1 000 Sofio

tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117